


# Aveno 31 & 32

*Aprilo 2008*

Saluton, karaj geamikoj !
jen la aktuala infomo pri AVE kaj nia kunlaboro kun la Verdaj Partioj. Mi almetas Aveno-n 31, kiu estis disdonita elektronike kaj papere dum diversaj kongresoj en 2007.
La enhavo de la rete dissenditaj Ave-Novaĵoj ne eblas prezenti tie; vidu: verduloj.org (nia nova adreso).
Kiel ĉiam mi petas vin kunlabori kaj laŭeble membriĝi en la Verda Partio de via lando. La Verda Movado ja ne nur bezonas NRO-ojn sed ankaŭ partion. La programoj de la Verdaj Partioj, kunligitaj tutmonde, ofte sub alia nomo (ekz-e: ekologia), enhavas la temojn pri la protekto de la naturo, de la Homaj kaj Bestaj Rajtoj, sociala justeco kaj paco. La Tutmonda Ĉarto de la Verdaj Partioj (2001, Canberra) montras tiun ampleksan gamon da gravaj temoj por ni.
La specifa valoro de AVE troviĝas en la ligo al kelkaj verdpartiaj organizaĵoj, kio montriĝas ekz-e en ligiloj el verdpartiaj retejoj al Esperanto. La publika prezento de Per Gahrton (verda politikisto en Svedio, 2007) pri komuna eŭropa lingvo - i.a. Esperanto - montras la apartan ligon inter Verduloj kaj Esperanto. Pere de la Tutmonda Ĉarto ekzistas ligoj el pluraj retejoj de Verdaj Partioj al Esperanto. Aparte interesa estos la 2-a Tutmonda Kongreso, kiu okazos 2008-05-01/04 en Sao Paulo, Brazilo. Mi dankas al la brazilaj samideanaj studentoj, kiuj prezentos AVEon kaj Esperanton; simile kiel en 2001, dank' aŭstralaj samideanoj kaj AVE-membroj.
Bondezirojn kaj pacon por ĉiuj.

**>> Bonvolu pripensi kaj laueble subskribi:**
La NRO "AVAAZ" petas alvoki la registaron de P.R.Ĉinio ke ili respektu la Homajn Rajtojn - rilate Tibeton; kaj ke la ĉina prezidento Hu pretas sincere diskuti kun la Dalai Lamao. Jen por subskribi:
avaaz.org/en/tibet_end_the_violence/98.php/?cl_tf_sign=1

> Kampanjo kontraŭ la mino-sternaj bomboj (grapol-bomboj); pli sub la 79-a SAT-Kongreso, kaj
www.handicap-international.org (franca, k.a.)
www.handicap-international.org.uk (angla)
www.stopclustermunitions.org (diversaj lingvoj)
www.streubomben.de (germana)

**>> Fiksdatoj:**
*Se vi intencas partopreni - bonvolu informi AVEon*
2008-05-01/04, Sao Paulo (BR), Tutmonda Kongreso de la Verdaj Partioj: AVE trovis partoprenantojn por kunsido kaj inform-tablo pri lingvaj aferoj. www.globalgreens.info

2008-07-19/26, Roterdamo (NL), 93-a UK de UEA: AVE okazigos publikan kunsidon kaj eble informtablon enkadre de la Fakaj Asocioj de UEA.
2008-08-09/16, Kazanlak (BG, Roza Valo), SAT-Kongreso: AVE enkadre de la Ekologiisma Frakcio kunvenos se iu el niaj membroj organizos ĝin.

2008-08-28/31, Frankfurt/Oder kaj Slubice (pola-germana urbo-paro ambaŭflanke de la rivero Oder): 1-a Someruniversitato de Eŭropa Verda Partio kune kun la Verda Frakcio en la EP. AVE ofertos laborgrupon pri la lingva politiko (2-3 horan) kaj certe eblos prezenti Esperanton sur inform-tablo/-budo; depende de nia kvanto ni povos oferti pli aŭ malpli.

Aliaj renkontiĝoj:
2008-08-01/14, Odessa (UA), Ekspedicio Dnestro, E-klubo Verdajho: <odesa.iatp.org.ua/esperanto/>
2008-08-04/11, Kingsnorth Power Station (bruligas karbon): "Camp for Climate Action". Temoj: vivi ŝpareme / edukado / agadi
2008-08-09, Kingsnorth: Day of Mass Action
http://www.climatecamp.org.uk
2008-08-10/17, Hanau (DE, ĉe Frankfurt/Main): Malferma tendaro (laŭ Ronaldo)

**>> Agado de AVE (2006 kaj 2007)**
*(koncernaj ret-paghoj je la fino)*
**> Kunlaboro kun la Verduloj:**
Milan Horacek, verdpartia EP-ano, subkomision-ano pri la Homaj Rajtoj, renkontis kun Sean O'Riain, de EEU, por diskuti pri la lingvaj temoj. Bernat Joan i Mari de la Verda-Regionalisma Frakcio paroladis pri lingvaj temoj en la EP.
AVEanoj instigis la Verdajn Partiojn fari ligojn al Esperanto, ekz-e al la Tutmonda Ĉarto de la Verdaj Partioj (eo). Benedikt Wildenhain de la Verda Junularo instruis '06 Esperanton okaze de ilia somertendaro, kaj metis detalan informon pri Esperanto sur ilian retejon, kaj eĉ informon pri la Verda Junularo en Esperanto. AVEano tradukis la ĝeneralan paĝon de la retejo de la BUND (Amikoj de la Tero, (DE)) en Esperanton.

**>> Financa raporto de AVE:**
Jenajn kostojn AVE nun ne bezonas pagi: Interreto, telefono, oficejo, vojaĝoj; nia konto: vidu je la fino.

**2006:** Unue: elkoran dankon al pluraj malavaraj donacantoj kaj al jam multe pli da kotizantoj. Enspezoj (en EUR): 1209, Elspezoj 1135, kapitalo: (-270). Ni uzis la monon por: Printado de Aveno 30: 239. Afrankoj (Aveno 30, la ekstereŭropajn mi transdonis dum la UK - dankon al subtenantoj, ekz-e el Brazilo !): 104. AVE subtenis: Partoprenon de Mramba Simba en Nairobi (Verda Tutmonda Junularo kaj MSF): 297. Tutmondaj Junaj Verduloj (Je la Eŭropa Verda Kongreso en Ĝenevo): 50. Kopioj, aliaj afrankoj, Paco-afiŝoj en Ĝenevo: 63. Por UEA: Kotizo & Salono en Vilnius: 111

**2007:** AVE subtenis la vojaĝon de Mramba Simba al Eŭropo, SAT-Kongreso: 265 EUR. Aveno 31 estis transdonita en la 3 kongresoj (SAT, EEU, UK) kaj dissendita kune kun #32. Kpitalo (-263)
AVE esperas pli da membrokotizoj (kaj donacoj) post la ricevo de Aveno 32.

AVE-anoj individue subtenas projektojn de NROoj; ekz-e <wecf.eu>, <aralsee.org> "Mehriban" en Uzbekio, por mildigi sude de la iama Aral-Maro la sanitaran situacion; pli: <ecosanres.org>.

**>> AVE kunlaborante kun esperantistoj:**
AVE-anoj partoprenis la Kongreson de la Eŭropa Verda Partio en Ĝenevo (2006-10-13/14); dank' al regionaj esperantistoj kaj AVE-anoj ni povis diskuti en pluraj lingvoj kun la verduloj.
La Eŭropo-Programon de la Eŭropa Verda Partio (2006, Ĝenevo) Leo de Cooman tradukis ghin en Esperanton. helpe de <lingvo.org/traduku/> kaj pluraj aliaj korektis kaj proponis terminologion (Brian Moon); strange pro la disversaj konsilioj. Ĝi estas elŝutebla ankaŭ de la retejo de la Partio (EuropeanGreens.org). Plia paŝo - Dankon!

> Dum la **IJK 2006** okazis diskuto de EDE pri politiko, kie ankau AVE estis prezentita, kaj Kristjan Schmidt disdonis AVE-Informilojn.

**> 79-a SAT K-o en Beogrado** (Serbio), 2006-08-20
Gesinjoroj Weiss el Francio preparis tre detalan dokumenton pri kontraŭ-personaj minoj (KPM) kaj pri bomboj, kiuj disĵetas multajn tiajn minojn (mino-sternaj bomboj (MSB), angle: Cluster Munition). La kontraŭpersonaj minoj estas malpermesitaj pere de la Konvencio de Otavo, sed ankoraŭ ne ĉiuj ŝtatoj subskribis kaj ratifis la konvencion.
SAT subtenas la Koalicion kontraŭ la Mino-Sternaj Bomboj, kiu celas malpermesi tiajn bombojn - kaj alvokas la francajn laboristojn de la firmao "Obus BONUS" rezigni pri la konstruo de MSB-oj - ĉar ili fakte egalas al kontraŭ-personaj minoj - kaj proponas anstataŭe konstrui mino-detruajn aparatojn.
Ĉiuj 45 minutoj paŝas iu homo sur minon, kaj perdas la vivon aŭ restas severe damaĝita dum sia tuta vivo. Unu mino-sterna bombo sternas ĝis mil da malgrandaj minoj; ne ĉiuj el ili eksplodas tuj, sed restas sur la grundo - fakte kiel anti-persona mino. Jen listo da landoj kiuj ne subskribis la Konvencion (stoko da KPM-oj (en milionoj)): P.R.Ĉinio (110), Hindio (5), Pakistano (6), Rusio (50), Usono (10), Norda Koreio (?), ...
**Pozitive: Belgio**, kiel la unua lando, malgraŭ la lobiado de la armil-firmaoj malpermesis produkti kaj uzi la MSB-ojn *(el la SAT-dokumento)*
Rimarko: intertempe malpermesis ankaŭ **Austrio.**

Israelo ĵetis la plej multajn MSB-oj sur la teritorion de Libano ĵus antaŭ la fino de la milito; 360 bomoj kun ĉ. 500.000 da minoj. Kaj tiel ĝenos la rekonstruon en tiu regiono dum jaroj. Mi ne scias ĉu Israelo subskribis la Konvencion de Otavo, sed ĉiukaze ili ne subskribis la novan konvencion kiu postulas de la militintaj partioj, poste ripari la civilajn damaĝojn kiujn ili kaŭzis dum la milito. *(laŭ radio-elsendo Deutschlandfunk, 2006-31-08)*

***Bonvolu subskribi por abolicii MSB-ojn (p. 1)***

**> AVE-Kunsido** enkadre de ekologia frakcio de la 79a SAT-Kongreso en Beogrado 2006-08-20. Krom konciza informo pri AVE ni diskutis pri:
- Bestaj Rajtoj: rilate la eksperimentado je bestoj por eltrovi novajn medikamentojn au eĉ plibeligenzojn. Ne eblas simple malpermesi; sed la nombro da eksperimentoj povas kaj devas esti reduktita, se oni plie aplikas provtubajn testojn, kunligas la rezultojn de diversaj firmaoj (en neŭtrala instanco), aplikas teoriajn metodojn uzante analogiojn. Por instrui studentojn en universitatoj eblas unue uzi simulado-programojn kaj plastikajn organojn (anstataŭ ranojn) kaj simple viziti buĉejon (dum ili ankoraŭ ekzistas) kaj uzi mortitajn korpojn (anatomio).
- Rubo: ekz-e en eksa Jugoslavio (el trajno videbla) ofte troviĝis hazardaj rubejetoj kaj kelkfoje oni bruligas la rubaĵon (Tereza Kapista rakontis similan el Burundio). Tia rubo-fumo enhavas toksajn substancojn (dioksinoj, pezaj metaloj (Cd, Hg), ktp., kancerogenajn fulgojn). Edukado kaj pli bona organizado de reciklado aŭ finfine bruligo de restaĵoj en taŭgaj instalaĵoj necesas. Pri rubaĵo-politiko de sukerofabrikado en Serbio ni aŭdis je la fino de la kunsido, surbaze de tio verkis rezolucion:

Eksciante, okaze de la kunsido de la ekologia frakcio dum la 79- a SAT-Kongreso en Beogrado, ke en Serbio ankoraŭ eblas al entreprenoj ŝpari monon sur la kostoj de la natura medio kaj de la civitanoj, ni decidis la jenan - koncizigitan:

**Rezolucio de AVE & la Ekologia Frakcio de SAT por Respondeca Produktado:**

La italdevena sukerfabriko en Senta en norda Serbio planas foruzi grandan terenon, ĉ. 1.000 ha, kie nun estas bienoj kaj somerdomoj en harmonio kun la naturo, por filtri malpurajn akvojn el la sukero-produktado, kiuj ĝis nun estas verŝitaj en la riveron Tisa. La plano ĝenas pro la jenaj kialoj:

1-e La fabriko aĉetos la terenon je prezo sub la aktuala valoro, laŭdire je 1/10 de la valoro. Kaj la nunaj multaj posedantoj estos devigataj vendi sian terpecon sen la ebleco akiri similan areon per tiu mono.

2-e La pejzaĝo, kie nun estas tre fekunda grundo kun multaj frukt-arboj kaj variaj kulturoj, perdas sian belecon kaj diversajn utilojn (freŝa aero, libertempo en la naturo, bonkvalitaj fruktoj) kaj oni antaŭvidas ŝanĝojn en flaŭro kaj floro al malpli alta biodiverseco (tie troviĝas ankaŭ sovaĝaj bestoj).

3-e Krome ni postulas de la ŝtataj, regionaj kaj lokaj administracioj ke ili postulu de la entrepreno modernan kaj daŭripovan manieron purigi la akvojn, kio nek ĝenas la homojn, nek la naturon.

Ni postulas kune kun la movado kontraŭ tiu plano, ke la firmao investu en instalaĵojn por purigi la akvon ene de la fabriko (laŭ la teknika nivelo).

>> **Esperanto-kongresoj en 2007** - jen la raportoj:

**80-a SAT Kongreso, Antony/Paris**, 2007-07-21/28

Denove okazis prezento pri la temo grund-minoj kaj "Pafaĵo-Ĵetoj el Bomboj" / Mino-Sternaj Bomboj / (mll. grapol-bomboj) (angle: cluster bombs). Bedaŭrinde ankoraŭ multaj grandaj nacioj produktas kaj aplikas tiajn detruilojn, kiuj eĉ post la milito malhelpas la evoluon de la lando kaj mortigas kaj kripligas homojn kaj bestojn. SAT celas al la sindikatanoj kiuj laboras en tiaj firmaoj, por ŝanĝi tian produktadon - ekz-e al maŝinoj por sendanĝere formeti la kuŝantajn milionojn da grundminoj.

Pozitive: En Kroatio okazas, subtenata de SAT-anoj, rapida formeto de la grund-minoj.

Interese estis la ekskurso al metiejo de handikapuloj, kiuj kapablas labori dum certa tempo, sed ne estas sufiĉe fortaj por labori "sur la libera merkato". Alia afero estas, ke multaj firmaoj preferas pagi anstataŭan pagon. Subteni kaj konsili la handikapulojn unuflanke, kaj trovi tiajn laborojn estas la zorgo de la organiza teamo. Ni vespermanĝis en la domo kie multaj el ili loĝas en agrabla etoso.

> La komunan **kunsidon de AVE** kaj de la **Ekologiista Frakcio** de SAT partoprenis 14 homojn, inter ili 8 AVE-anoj. Ĉefe ni diskutis pri la energio-politiko de Francio kunligita kun la atom-bomba armeo. Ni verkis resolucion pri tio. Claude Bros tradukis ĝin en la francan kaj niaj francaj geamikoj prezentis ĝin okaze de la Somera Universitato de Les Verts en Bretonio fine de Aŭgusto.

> **Rezolucio de AVE & la Ekologiista Frakcio** okaze de la 80-a SAT kongreso en Antony/Parizo. Koncize: Ni Postulas de la registaro kaj la parlamentanoj de Francio haltigi la evoluon de la atomfenda teknologio. Haltigi la evoluon de la Force de Frappe; forte subteni la evoluon de propra industrio de la alternativaj energioj (suno, vento, akvo kaj biomaso). Eviti la hejtadon pere de elektra kurento, sed plibonigi la izoligon de la konstruaĵoj kontrau la malvarmo kaj apliki la konvenaj teknikoj por la konstruaĵoj (varmigi, malvarmigi, aerumi.).

Komento (2007-11-28): La nova prezidanto de Francio N.Sarkozy jam parolis pri tia evoluo; tamen li ĉefe apogos sin sur la atom-centraloj kaj -bomboj; ekz-e ĵus vendis du novajn al P.R.Ĉinio.

**7-a EEU-Kongreso en Maribor**, 2007-07-29/08-04

Ĉefaj temoj: Akvo, kaj Interkultura Komunikado. Pli je EEU <europo.eu> . La AVE-Kunsidon partoprenis entute 17 homoj, inter ili 7 AVE-anoj. Krom la prezento de AVE kaj ĉi-rilataj demandoj ni verkis rezolucion proksime al la kongres-temo "Akvo".

* Jam en la malferma sesio ni aŭdis tre belan kaj filozofian prelegon pri la konferenca temo Akvo de profesoro **Endre Dudich** el Hungario.

La Akvo-Konferenco okazis en la domo de la firmao Andragorski, kiu provizas la regionon per tre bongusta trinkakvo. La prelegoj:

* **Vesna Obradovic** (Slovenio, EEU-Kongreso) "Akvaroj en Slovenio"

Ŝi montris la tre variajn riverojn, lagojn kaj karst-grotojn per tre interesa softvaro, de slovena firmao Burger, kiu ebligas virtualan tridimensian ĉirkaŭ-rigardon eĉ en la kavernoj.

* **Manfred Westermayer** (Germanio, AVE), "Agendo 21 - Ni kaj la Akvo":

Pri la danĝeraj influoj de la homoj (agrikulturo (tro-sterkado kaj pesticidoj), kloakaj akvoj el domoj kaj fabrikoj, plastaĵo-pecoj en la akvo kaj la kvar san-danĝeraj kemiaĵoj el la plastaĵoj, kiuj amasiĝas en la graso de tiuj bestoj kiuj staras je la pinto de la nutro-ĉeno). (prelego sur www.verduloj.org; algalita.org)

* **Jose Salguerdo kun sia edzino** (Hispanio, Estremadura), Birdoj - terminolgio: Kelkaj

ekzemploj de akvo-birdoj kun la duopaj nomoj, sciencaj kaj popularaj.
* **Normando Fleury** (Kanado, Botanika Ĝardeno de Montreal), Arbaroj kaj la Akvo: Prezentis kontraston inter mult-speca natura arbaro kun plantita, ofte monokultura forsto. Monokulturoj, ekz-e eŭkalipto-arboj, detruas la biodiversecon kaj facile ek-brulas. Por sekaj regionoj arbaro helpas kontraŭ erozio, kaj ekz-e la speco jatrofo samtempe protektas la grun-don per siaj radikoj kaj produktas oleon en aridaj regionoj; en ties ombreto eblas kultivi legomojn.
* Profesorino **Rafaela Oruena** (Hispanio, internacia juristiko), Internacia Juro de la Akvaroj: Ŝi prezentis la evoluon de tiu internacia leĝaro, kiu nun preventas militojn. Restas problemoj, ekz-e Slovenio havas 40 km da marbordo, sed la maro apartenas aŭ al Italio aŭ al Kroatio. Kaj je pli granda areo: Rusio nun asertas, ke la tuta regiono de la arkta oceano (ĝis la norda poluso) apartenas "pro geologiaj faktoj" al Rusio - por pli poste ekspluati la tieajn marajn resursojn.

**> Resolucio de AVE por Protekti la Akvon**
(7-a EEU-Kongreso, 2007-07-31 en Maribor)
- Sciante, ke en kelkaj regionoj estas industrio de bestobredado, kiu havas la problemon de tro da sterko, kiu poluas la grundakvon kaj la riverojn.
- Sciante, ke la trofiŝado endanĝerigas multajn speciojn da fiŝoj kaj aliajn marbestojn; sekve de tio ankaŭ la biodiverseco en la akvaro malpliboniĝas.
- Sciante, ke por kapti kelkajn speciojn da fiŝoj estas uzataj retoj, kiuj skrapas sur la grundo de la maroj kaj tiel postlasas "dezerton" por longa tempo.
- Sciante, ke bredi fiŝojn en kaĝoj en la maro, kaŭzas problemojn de la distribuo de malsanoj kaj ligita kun ĝi poluado de la mar-akvo kun antibiotikaĵoj.
- Sciante ke la bredado de kraboj kie estis praaj mangrovaj arbaroj endanĝerigas unuflanke la sekurecon de la homoj kaj aliflanke la naturan kreskadon de fiŝidoj protektitaj kontrau rabofiŝoj de la mangrovaj radikoj.
- Sciante, ke la uzo de medikamentoj postlasas aktivajn substancojn en la akvo, kiuj ofte estas persistaj; kaj - eĉ pli - la forĵeto de neuzitaj en la kloako-kanalon povas kaŭzi malbonajn efikojn en la naturo, kaj poste ankaŭ kiam tiaj substancoj re-iras en la trinkakvon, ekz-e kontraŭkonceptivaj hormonoj.
Ni postulas de la koncernaj komisionoj ene de la EU kaj ankaŭ de la UN, ke ili informu la konsumantojn pri tiaj kromefikoj, kaj ke ili postulu taŭgan ŝanĝon de la koncernaj teknikoj, flanke de la industrio.
: Ke la bestobredado devas esti en akordo kun la koncerna areo, ke el la sterko aŭ urino eniru nenio nek en la grundakvon, nek en fluantajn riverojn; kaj ke ankaŭ la amasa tenado de la bestoj devas esti konforme al ilia naturo kaj same ke la transporto de vivantaj bestoj ne estu tro for.
: Ke la kvanto da fiŝkaptaĵo estu pli severe limigita kaj kontrolita; kaj ke konsumantoj estu informitaj kiuj fiŝoj oni prefere ne manĝu por ebligi ilian pluekzistadon.<wwf.de/fisch>, <goedevis.nl>
: Ke la uzado de grandaj surgrundaj retoj estu malpermesita entute; kaj ke oni ne rajtas lasi restaĵojn de retoj en la maro.
: Ke la bredado de fiŝoj en kaĝoj donu multe pli da spaco por la fiŝoj kaj necesas malpermesi persistajn medikamentojn por tia bredado, pro la kunligitaj san-problemoj.
: Ke la detruo de mangrovaj arbaroj ne estas akceptebla, kaj ke el la jam detruitaj oni restarigu plej gravajn partojn. Sekve de tio necesas aŭ redukti la bredadon de kraboj entute, aŭ esplori aliajn medio-konformajn teknikojn.
: Ke oni esploru la vojon kaj efikojn de medikamentoj post la uzo, aparte en la akvo-sistemoj kaj eĉ en la trinkakvo. Kiam ili restas necesaj, oni esploru taŭgan vojon por malebligi la endanĝerigon de la vivantaro. Ne plu uzeblajn medikamentojn oni forbruligu en taŭgaj instalaĵoj.

**AVE-Kunsido, 92-a UK, Jokohamo, 2007-08-07**
Kunordigite de José Antonio Vergara, okazis la AVE-kunsido (17 homoj, 45 min-oj).
* Dominique Vasconi-Couturier raportis pri la Esperanto-komisiono de la Verda Partio en Francio (Les Verts), kiu lastatempe spertis reviviĝon (20 partoprenantoj, inter ili 10 partianoj). Ŝi invitis al la Somera Universitato de la Partio.
* José menciis ke en Francio membroj de la Verda Partio kiuj kampanjis por la "Ne" en la europkonsti-tucia referendumo starigis kun similtendencaj verduloj el aliaj europaj landoj la reton Alterecolo, t.e. maldekstraj verduloj. <alterecolo.org> :
Kiu interesiĝas je ruĝverda frakcio ene de AVE ?
* Aveno #31 entenis alineon kontraŭ la mortpuno en Japanio. Pro tio oni diskutis pri tio.
La mortpuno estas uzata en Japanio sub strange severaj cirkonstancoj; pri kio Ljo informis AVEon. Japanaj kunsidantoj iom parolis pri la situacio en la propra lando.
* S-ro HOSIDA Acusi rakontis per japanlingva bildlibro, tradukita en Esperanton, tre interesan historion pri ekologia krizo sur japana norda insulo pro troa ekspluatado de la arbaro; kio siaflanke grave minacis la kulturadon de algoj de tiu fiŝisto-komunumo. Iu pripensis kaj organizis planti arbojn, kaj sekve de tio la mar-akvo denove iĝis pura, por

daŭrigi la algo-kultivadon. Temis pri tre instiga kaj bele prezentita konkreta ekzemplo de la kerna interrilato ekzistanta inter la naturmedio kaj la homaj vivbezonaĵoj.

**>> AVE kaj la Verdaj Partioj**

> **Francio** (raporto de Michael): La Esperanta Komisiono de la Verda Partio de Francio renkontiĝis dum la "Someraj Tagoj", 2007-08 en Quimper (Bretonio, FR). Ni konstatis ke la agado kreskis ekde 2007. Claude Labetaa partoprenis la EEU-Kongreson en Maribor; Michael Leibman partoprenis je la SAT kongreso; Dominique estis en Yokohama por la UK. Ni disdonis trilingvan flugfolion (franca, esperanta kaj bretona) por klarigi ke esperantistoj defendas la lingvodiversecon. Ni notis ke la ekologiaj temoj ŝajnas interesa pli kaj pli por la e-movadanoj, kiel montras la dua temo "Akvo" de la kongreso de Maribor, kaj la prelego pri "Genetike Modifitaj Organismoj" ĉe la SAT Kongreso.
Ni ĉiuj pensas ke funkcianta, videbla retkomunik-adilo, je dispono de la verdanoj, estus la plej bona argumento favore al Esperanto ene de niaj partioj. Ĉ. 25% de la AVE-anoj estas membroj de iu Verda Partio. Tiuj kiuj havas tempon kaj kapablon skribu aŭ traduku artikolojn en Esperanton. Kiom da legantojn ni povos havi? Ĉiukaze gravas montri, ke ni kapablas kunlabori trans la limoj dank' al Esperanto. Mi emfazis la kvaliton de la interkomunikado kiun mi konstatis ĉe la SAT kongreso kompare kun la PVE (Eŭropa Verda Partio) kongreso, kie preskaŭ ne ekzistas vera komunikado inter la membroj eksterkadre de la kunsidoj.
Estas impresege kiom esperantistoj povas fari pere de «amatoraj» rimedoj kompare kun la profesie anglalingve instruitaj homoj.
* Ni volas substreki ke la nura uzo de la angla kondukus la Eŭropan Verdan Partion, ke nur elito kapablas efike esprimi sin, dum la plimulto penas por nur iomete kompreni *).
* Ni celas: Pli multnombre partopreni en la diversaj komisionoj de nia partio kiuj okupiĝas pri internaciaj temoj kaj edukado. Ni volas unuflanke klopodi komuniki esperantlingve pri internacia temaro, aliflanke batali, helpe de diversaj dokumentoj, ĉefe la Raporto Grin kaj la Eŭropa Komuna Referenckadro, instigi, kadre kaj eksterkadre de la Verda Partio al serioza pripenso kaj diskuto pri la lingva politiko kaj pri la funkciado de la eduksistemo rilate al la lingvoinstruado.
* Elekto de la **nova estraro**, sen kontraŭ-voĉoj: **Jean-Paul Quentin** deklaris sin preta labori kiel sekretario, kun la helpo de **Dominique Vasconi-Couturier** kaj de sia najbaro **Claude Labetaa**. **Michael Leibman** estis elektita respondeculo de la komisiono ĉe la nacia kunsido de «Les Verts»; kiel denaske anglan parolanto kaj profesie instruisto de la angla li povus instigi al iuj rekonsideri iliajn antaŭjuĝojn pri esperanto. Kasisto: **Jean Richard** . Dominique estis komisiata por komuniki kun UFE-UEA, kaj Michael kun SAT.
* Ni volas nepre profundigi nian kunlaboron kun AVE kiu jam estas de multaj jaroj aktiva propagandisto por Esperanto ene de la Verdaj Partioj; ni esperas ampleksi la reton de Verdanoj kaj akiri pli grandan videblecon, pri kaj pro Esperanto. La Verdaj Partioj bezonas Esperanton ĉar estas finfine ne eble fari novajn internaciajn politikaĵojn pere de malnova misfunkcianta lingvosistemo.
Michael Leibman <m.leibman@wanadoo.fr>
(reduktita de MW)
*) Komento de MW: Okaze de la Eŭropa Verda Kongreso de la Verduloj 2006 en Ĝenevo prezentita "Kontribuo pri la lingva politiko inter la Verduloj" i.a. entenis proponon esplori la potencialon de Esperanto; havebla en la franca, angla kaj en Esperanto (AVE-retejo). Mi substrekas liajn salutojn al ĉiuj AVE-anoj, kunlabori en/kun sia nacia Verda Partio kaj Movado.

**> Pli pri Esperanto ene de la Verdaj Partioj:**
* **Per Gahrton**, iama MEP, de la sveda VP, publikigis ideon pri la lingvo-uzado en la EU. I.a. li proponis Esperanton. Dariusz Szwed de la pola VP (zieloni2004.pl) petis nin traduki ilian programon sur la Vikipedio al Esperanto; mi sukcesis meti la ĝeneralajn informojn kaj la koncernajn ligilojn (mankas traduko de la programa teksto). Mi dankas al niaj polaj samideanoj kiuj voĉdonis por la Zieloni
* Ni partoprenos la 2-an Tutmondan Kongreson de la Verdaj Partioj, 2008-05-01/04 en Sao Paulo (BR) kaj la Eŭropan Verdan Someruniversitaton en Frankfurt/Oder kaj Slubice.

* Tutmondaj Verdaj Partioj: <globalgreens.info>
Verdaj Partioj en Japanio kaj en Koreio estas ne-konataj, sed ekzistas parencaj organizaĵoj.
* JP (Ĉielarko,Verduloj): <nogiintokken2007.net>
* Ĉinio (en, zh): www.greenpeace.org/china/ ; Verda Partio ne rajtas fondiĝi. Laŭ informo de ĉina studento ekzistas aliaj malnovaj partio-organizaĵoj - sen politika funkcio - krom la Komunista Partio.
* En pluraj (inter ili 6 aziaj) landoj laboras oficejoj de la Fonduso Heinrich Boell, la «pens-fabriko» (de, en, es): <boell.de>

**> La Asocio de Verduloj Esperantistaj** estas malgranda Ne-Registara Organizaĵo. AVE-membroj parolas Esperanton kaj favoras ekologian, socialan, pacan kaj viv-subtenan politikon; aktivas en Neregistaraj Organizaĵoj aŭ Verdaj Partioj.
> En 2007 pere de AVE ligiĝas ĉ. 300 membroj kaj 30 abonantoj tutmonde. La membro-kotizo estas libervola (propono 5 EUR). AVE pagas por UEA renkontejoj, por Aveno kaj diversaj subtenoj.
> AVE kunlaboras kun UEA (faka asocio) kaj SAT (ekologiisma frakcio), EEU, krome kun organizaĵoj, kiel ekz-e la "Eŭropa Verda Partio" kaj NROj. Ni partoprenas "tutmonde" dank al la surloka organizo de samideanoj (Aŭstralio 2001, Svisio 2006, Nairobio 2007, Sao Paulo 2008 ?). Ni tradukas gravajn tekstojn de la Verdaj Partioj kaj de la Movado.

**> Nia historio:** AVE estis fondita 1984 en Liège (BE) okaze de la unua renkontiĝo de la eŭropaj Verdaj Partioj. 1991 la unua eŭropa kongreso de la Verdaj Partioj en Zuriko ĝuis la interpretadon de la ĉefaj prelegoj en Esperanton fare de Claude Gacon kaj Claude Piron, kaj dank' al niaj geamikoj el Francio kaj la svisa kongres-organizanto Hans Beat Schaffner. Manfred Westermayer, sekretario ek de tiam kaj George Sossois (ek de 2005, UK Vilnius); komitatanoj aktivas sur diversaj kontinentoj kaj temoj.AVEanoj preferas neformalan AVE-statuson.

**> Komunaj aktivecoj de AVE** estas diversmanieraj (manifestacioj, kolekto da subskriboj, subtenaj leteroj). Respektoplene mi metas gamon da konstituciaj reguloj aŭ proponoj karakterizante daŭrigeblan paceman vojon sur nia tero. Ne necesas listigi la nomojn de la respektivaj landoj aŭ organizajhoj. La homa historio plenas da kruelaĵoj, evoluo al pliboniĝo, re-faloj al netaŭgaj arĥaikaj tradicioj. Stulteco ŝanĝiĝu espereble al saĝeco; malhumaneco kaj interetna malamo al respekto de la Homaj Rajtoj; krueleco kontrau la naturo pro avido al ekologia sinteno kaj respekto de la Bestaj Rajtoj; finfine ni lasu spacon ankau por humoro kaj ghojo.

AVE ĝenerale estas por: (*numeroj senrangaj*):
1: Abolicii la mortpunon en ĉiu lando; ĉar tiu arĥaika rimedo de venĝo ne povas preventi aliajn krimojn, sed de si mem estas krimo kontraŭ la Homaj Rajtoj de korpa integriĝo ... (Deklaracio, Art-oj 1-5). Ĝi ne nur detruas la krimulon sed ankaŭ ties familion. Aparte gravas, ke eĉ en bone evoluitaj ŝtatoj jam okazis centoj da ekzekutoj de homoj, kiuj poste montriĝis ne-kulpaj.
(PR Ĉinio, Usono, Israelo, Japanio, Libio ! ...)
2: Abolicii atombombojn k.s.. amas-mortigilojn.
3: Abolicii produktadon kaj uzadon de minoj/eksplodiloj, unuarange tiaj kiuj eĉ post la milito kripligas aŭ mortigas homojn kaj bestojn - ekz-e grapolbomboj.
4: Subteni ne-militara/civilan konfliktreduktadon inter la etnoj aŭ religioj, pere de interkonatiĝo kaj interkompreniĝo kaj justa dispartigo de la resursoj kaj areoj.
5: Abolicii agresojn; kunlabori en internaciaj pacigaj disponoj/rimedoj de la UN, trejni la soldatojn kaj iliajn gvidantojn al propra respondeco kaj respekton.
6: Subteni demokration kun povo-dispartiga organizo, kiu preventas korupcion kaj ebligas socialan justecon (v. la proponitan libron "Kio estas Demokratio ?").
7: Malakcepti subtenon de diktaturaj sistemoj; informi kaj subteni tieajn homojn pri alternativoj.
8: Evalui diversajn indeksojn por mezuri la kvaliton de la propralanda: "ekologia piedpremo", demokratieco, ĵurnalisma libereco, korupcio; cele al pliboniĝo.
9: Subteni liberan ĵurnalismon; nepra rimedo por ekscii la propran historion, kontraŭ diktatoreco, korupcio. 10: Konscii la historion de la propra lando, etno, familio; unue ne-tabuigi sed diskuti publike la estintajn fifarojn kontraŭ homoj de alia etno aŭ religio, due instrui ĝin al la lernantoj (aĝo-konforme) por preventi estontajn fifarojn, trie laŭeble pardonpeti k. reparacii.
10a: Abolicii seksajn krimojn de soldatoj kaj seksan sklavecon organizita de krimuloj.
11: Akuzi ĉi-rilatajn fifarojn de la registaroj je la Internacia Juĝkortumo; aktuale: PR Ĉinio, Irano, DPR Koreio, Rusio, Usono, Sudano, Zimbabwo, ...
12: Malpermesi GMOn (gen-teknike modifita organismo) en agrikulturo kaj bruto-bredado.
13a: Protekti bestojn, specio-konforme tenadi, preventi torturojn je tenado kaj transportado de la brutaro.
13b: Malpermesi eksperimentojn kun animaloj, kaj kun homoj sen ties akcepto.
13c: Postuli alternativajn metodojn por esplori medikamentojn, anstatŭ uzi vivantajn bestojn.
14: Ordoni regulojn por fiŝistoj, fiŝkapta kaj resurso-ekspluata industrio, por limigi la kvanton, ne dronigi delfenojn k.a., por ne detrui la ekosistemon de la mar-fundo, de koralo-rifoj, de la marbordoj (mangrovoj).
15: Ne ĵeti/alporti en la naturon danĝerajn kemiaĵojn, i.a. agrikulturaj, plasto-moligenzoj, protektenzoj.
16: Malpermesi persistaj/daŭrajn organikajn poluaĵojn (ksenohormonoj), kiuj endanĝerigas la

hormonajn ciklojn de la vivantaro.
17: Subteni la agadon por Vivantaj Lagoj; ekz-e regajni la Aral-Maron en Centra Azio. AVE subtenis projektojn de arboplantado por filtri la danĝeran fajnan polvon el la aero, kaj por bona kvalito de la trinkakvo; ni eldonis broŝureton pri la Aral-katastrofo. MW estas membro de Aralsee-Hilfe, kiu praktike helpas en tiu regiono. Sed la nuna uzbeka registaro malebligas rektan helpon. Kasaĥio pli bone gardas la akvon de la rivero Syr Darja, kaj tiel sukcesis revivigi almenaŭ la nordan parton "Malgranda Aral".
18: Kolekti rubaĵon laŭ materialo; aparte plastaĵo, por eble reuzi ĝin, anstataŭ forĵeti en la naturon/maron, kio endanĝerigas birdojn, bestojn kaj fiŝojn.
19: Racia uzado de la resursoj: efika uzado de energio, nefosiliaj energioj, klimato-adaptaj konstrumetodoj.
20: Apliki energioalternativojn sen detrui la naturon.
20a: Konstrui energio-ŝparemajn domojn kaj aparatojn.
21: Evolui la publikan transporton kaj eblecon bicikli sendanĝere; fi-famigi tro grandajn aŭtojn, k.s. luksaĵojn, kiuj forvoras niajn resursojn.
22: Preventi la troan kreskon de la urbegoj, pere de pli bona evoluo de mezgrandaj kaj vilaĝoj.
23: Subteni racian naskokvanton, laŭ regionaj kondiĉoj, pere de informa klarigo kaj evoluo de sociala justeco, kiu reduktas la bezonon havi multajn idojn.
24: Subteni san-subtenan kaj vegetaran manĝadon.
25: Subteni ekonomian kaj kulturan tutmondiĝon metante socialajn kaj ekologiajn framokondiĉojn: kontraŭ danĝera poluo de la grundoj, akvaroj, aero.
25a: Abolicii la ekspluaton de infanoj kaj laborsklavoj.
26: Abolicii mono-oazojn kie oni ne pagas impostojn kaj kie kaŝmono estas lavata.
27: Favori tutmondan sistemon da ekologiaj impostoj, forpreni profito-avantaĝojn pro malgardemaj registaroj.

## >> NROoj pri Homaj Rajtoj:

> 2007-09-13, Unuighintaj Nacioj (UPI) La Ghenerala Asembleo de UN en Nov-Jorko, kun malkonsento de Usono, aprobis la "UN-Deklaracion pri la rajtoj de indigenaj popoloj", tradukita de Leo Cooman en E-on.

> 2008-03-19, Tibetaj budhistaj monakoj ek de la 10-a de Marto manifestaciis (komence pace) kontraŭ la kultura subpremo flanke de la ĉina registaro. Post preskaŭ 50 jaroj de ĉina okupado kaj de Tibeto la etnaj tibetanoj elsendis tutmonde aŭdatan proteston. Ĉinaj policistoj jam mortis pli ol 100 homojn, pli multaj estas malliberigataj.
Intertempe ĵurnalistoj ne plu povas labori libere tie. La Dalai Lamao ja ne (plu) celas sendependan ŝtaton Tibeto, sed ke la Aŭtonoma Provinco Tibeto havu - kulture, religie, socie - veran aŭtonomion*.
La NRO "AVAAZ" petas alvoki la registaron de P.R.Ĉinio ke ili respektu la Homajn Rajtojn - rilate Tibeton; kaj ke la ĉina prezidento Hu pretas sincere diskuti kun la Dalai Lamao. Jen la adreso por la subskribo: <avaaz.org/en/tibet_end_the_violence/98.php/?cl_tf_sign=1>

Nuntempe P.R.Ĉinio atendas la sportistojn de la tuta mondo por festi harmonie la Olimpikajn Ludojn; harmonio ne estad dividebla. La olimpika tradicio, malpermesas militon dum la Olimpikaj Ludoj.
Jen informoj de "Human Rights Watch" hrw.org/english/docs/2008/03/15/china18291.htm kun la peto ke P.R.Ĉinio finu la brutalan atakon kontraŭ la manifestaciantoj.
* MW) Ĉinio setligis han-etnajn kamparanojn en la aŭtonomajn provincojn, kiel ankaŭ Interna Mongolio. Ili uzas agrikulturon kaŭzante erozion, polvoventegojn kaj perdon de la fekunda tero, anstataŭ la - tie daŭrigeblan - nomadan kulturon de paŝtado.

## > Indiĝenoj en Ĉilio kaj en Eŭropo

Wilfried Telkaemper, nia eksa verda eŭroparlamentano eldonis dulingvan libron en la mapucha lingvo kaj la germana pri la historio de la konkero de la lando de la Mapuche (ĉ. 1990).
Nicole Margot de Etnismo kaj José Vergara el Ĉilio diskutis pri la aktuala subpremo de Mapuche kaj aparte pri Juana Calfunao. Jen nur momento el tiu-ĉi diskuto. pli: <verduloj.org> , sub Nia Mondo:
Nicole: "Interesus min, se eblus, havi infomojn pri la oficiala politiko de Chilio rilate Mapuchojn. Chu estas legho por protekti iliajn rajtojn pri iliaj teroj kaj ilia kulturo? Via opinio pri Juana Calfunao estas, ke shi apartenas al perfortema grupo. Eble vi pravas, mi ne havas sufiche seriozajn argumentojn por tion konstraustari. Tamen mi havas kelkajn: Chu vi certas, ke la chilia televido donas ghustan kaj kompletan bildon de la tuta afero? La mapuchoj kontestas tion en iliaj informoj.
Mi renkontis Juana Calfunao en Ghenevo, ne persone char mi ne parolas la hispanan, sed mi auskultis shin kaj vidis shian sintenon en la grupo, kie estis multe pli da sudamerikanoj ol da ghenevanoj. Kaj mi vidis virinon tre paceman, dignan, homecan. Tio tamen ne malhelpas min pensi, ke en shia lukto shi estas nekredeble obstina kaj povas en kelkaj kazoj uzi forton. ..." Parto de la reago de Nicole al José.

Komento de AVE (MW): En Eŭropo la ciganaj etnoj de Roma kaj Sinti spertas eble similan sorton kiel la Mapuche; ĉar la okcidenta civilizo estas alia ol ilia vivmaniero. Multaj indiĝenaj popoloj havas similajn problemojn, pro la granda diferenco de la respektivaj kulturoj. Asocio por Edanĝerigataj Ppoloj [es]: <gfbvchile.com>

**> Ĝenerale pri Bona Regado** (MW): Evidente la temo ankaŭ rilatas al la politika sistemo de koncerna lando. Demokratio povas ekskludi minoritatajn homojn, kaj akrigi la socialajn diferencojn pere de demokrataj leĝoj - aparte kiam la reprezento de la etnoj kaj «sociaj klasoj» en la parlamento kaj registaro ne konvenas la realan populacian distribuon. La kutima alpropriigo de la grandaj terenoj, la enkludo en la reganta sistemo kiu ne ampleksas ĉiujn grupojn, kaj ne uzas konsenton - sed majoritatan (51%-an) ekskludan manieron, signifas neegalecon de la ŝancoj. Tiu kiu bone kaj multe laboras kaj bone mastrumas bienon aŭ firmaon rajtas ĝui la fruktojn, sed finfine li ankaŭ havas devojn kontraŭ la komunumo, kiu ebligis al li tion. Leĝoj kiuj ebligas al riĉuloj kaj firmaoj pliriĉiĝi surbaze de la laboristoj estas ne-legitimaj, kvankam laŭleĝaj; same senimposta heredo kaj komfortaj pensio-pagoj al oficistoj kaj gigantaj "salajroj" al manaĝeroj signifas malbonan distribuon de la resursoj. Ekspluato de la teraj resursoj devigas al pago de justa procentaĵo al la koncerna lando - eble ankaŭ al la Unuiĝintaj Nacioj. La lastatempe elektitaj prezidentoj en kelkaj sudamerikaj ŝtatoj montras la renverson de tiu malbona politiko; espereble ili ne nur renversas, sed plibonigas la politikon en sia lando kiel tutmonda modelo.

Malbona ekzemplo estas videbla ekz-e en Zimbabvo, kie etna prezidento Mugabe gvidis la landon en ĥaoson, eĉ la propra etno malgajnis.

Simile temas pri la militoj kaj koloniigadoj pro la resursoj (mineraloj kaj energiofontoj); ĉiu granda kaj sufiĉe forta ŝtato klopodas akiri aliron al tiaj resursoj - jen per milito, jen per subpremo de la enloĝantoj. La mondo devus akiri komunan regadon pri la resursoj; ekz-e prezentita pere de la Mond-Civitanoj: <recim.org/kdp/dm04-eo.htm>

Monda Asembleo Sociala: <mas-eo.org>

**> Libroproponoj:**

J.N. Sokolov, **Ekologio de la Homo** - el sistema vidpunkto (1996), trad. de T. Auderskaja, Odessa, , havebla de AVE, ĉ. 60 p., 5.00 EUR

**"Kio estas Demokratio ?** - 80 Demandoj kaj Respondoj", 143 p., UEA, ISBN 92-9017-066-2 .

**Novaj libroj de SAT:** "Mortpuno" kaj "Chu ili diris la veron ?" Kruelajhoj en DPR Koreio.

**Pliaj ret-ligoj pri Verd... kaj Esperanto:**

Pri lingva politiko je Tutmondaj Verduloj:
http://plan21.globalgreens.org/plan21_Workshops
www.gruene-jugend.de/aktuelles/111036.html
www.gruene-jugend.de/nachrichten/98888.html
Tutmondaj junuloj: www.globalyounggreens.org
europeangreens.org/cms/default/dok/164/164873.pdf _versions_in_different_languages@en.htm

Amikoj de la Tero / BUND (& eo), ktp:
http://vorort.bund.net/suedlicher-oberrhein/
Israela-palestina paco-oazo: www.nswas.org

Aliaj Esperanto-Organizajhoj:
Mondialismo: globidar.org;
Monda Asembleo Sociala: mas-eo.org;
SAT: http://satesperanto.free.fr
Europa Esperanto-Unio: europo.eu;
Tradukilo, ktp.: lingvo.org

Aliaj NROoj - en aliaj lingvoj:
Verdpaco: greenpeace.org
Ekspluata kodekso: eitransparency.org/
Kuracistoj kontrau atombomboj: ippnw.org

**Interreta diskutlisto de AVE**: Niaj temoj: Ekologio, Sociala Justeco, Homaj kaj Bestaj Rajtoj, Milito kaj Paco, Konfliktsolvado pere de civilaj agadoj: http://lists.riseup.net/www/info/verduloj

---

*Multaj menciitaj dokumentoj estas en nia retejo, sub Dokumentoj. Elkoran dankon al ĉiuj kontribuintoj.*

Asocio de Verduloj Esperantistaj, AVE
sekretario: Dr. Manfred Westermayer
Kandelstr. 62
D-79194 Gundelfingen
Retadreso: ave@verduloj.org
Nova nomo por nia retejo: www.verduloj.org
Kotizo (libere, 5 EUR jare) & kroma subteno al nia:
UEA-konto: avex-z, indiku: "*via nomo, por AVEx-z*"
Aŭ tutmonde al la posht-konto de UEA en Nederlando:
IBAN: NL24PSTB0000378964,
BIC/SWIFT: PSTBNL21
Germanio: Postbank Koeln de UEA, Konto: 318291 509, BLZ 370 100 50

**AVE - la ligo inter Verduloj kaj Esperantistoj**
**Ni pensas Tutmonde - Ni agas Surloke kaj Regione**